



KONGA STELO

Nyota ya Kongo



*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Junulara Organizo)
kunlabore kunaliaj kongolandaj organizoj.*



Enhavo

Redakcie	1
Promociado de Esperanto en DR Kongo	2
Esperanto en Rutshuru	3
110-A UK, Brno: Dua Bulteno	5
Distanca Esperanto-kurso por UEC	6
KJBEL	9

Lubumbaŝo alpaŝas esperantujon	10
DKEJO, funkcimaniro	11
Mistera pakaĵo	15
Forpasis nia mentoro, R. Corsetti	16
Esperanto, ĉu pakto kun la diablo.....	17
La suahila : la imperativo.....	18

Redakcie Joel Muhire



Saluton karaj!

Kiel vi scias, nia lando suferas konflikton de pluraj jardekoj, kaj ĉi-jare la situacio fariĝis eĉ pli neeltenebla – orientkonganoj troviĝas en tre malfacilaj vivkondiĉoj pro la invado de la urboj Goma kaj Bukavu. Tamen esperantistoj el tiuj teritorioj, aŭdacaj kaj celkonsciaj pri nia bona afero daŭre aktivas, kvankam pene.

Ja la mondo bezonas Esperanton, DR Kongo bezonas Esperanton. Por pli paca mondo, mi admonus ke ĉiu kursgvidanto disvastigu Esperanton konsciigante pri ĝia interna ideo: —*sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkitimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton*”, mi pensas ke tio povus multe pli puŝi al batalhalto tra la mondo, ĉu ne ?

Nun, jen je via dispono la 4a numero de Konga Stelo kiu kiel kutime estas diverstema. En ĝi vi trovos artikolon pri promociado de Esperanto en DR Kongo, de **Waziwazi Grâce**, raporton pri Verda Stelano Klubo, de **Honoré Sebuho**, el la Gazetaraj Komunikoj de UEA vi legos pri la dua bulteno (110a UK). Ĉu vi aŭdis paroli pri distanca Esperanto-kurso por la Universitato Espoir du Congo, UEC ? **Françoise Noireau** el Francujo donos al ni pli da detaloj ĉe la paĝo. Ĉi-numere **Joel Muhire** prezentas al vi interesan lecionon pri la sŭahila. Mi lasas al vi malkovri mem la buntan enhavon. Bonan legadon !

Konga Espero (KS) estas trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Junulara Organizo) eldonata kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.

Redaktoro: Joel Muhire

Kontaktoj: joelmuhire0@gmail.com, Tel. +243 977 643 030

La estraro de DKEJO (2025-2028)

Prezidanto : Waziwazi Grâce,

Tel. +243 976 413 837, rete: dkejo@outlook.com.

Vicprezidanto : Ramazani Nanjira, Tel. +243 981 137 264

Sekretario : Jofina Mungosy, Tel. +243 979 051 901

Kasisto : Ornella Idumba, Tel. +243 970 702 532

Konsilanto: Carine Idumba, Tel. +243 893 174 046

Kiel sendi kontribuojn al Konga Stelo?

- ✓ Prefere sendu tekston originale verkitan en Esperanto kun foto/bildo memfarita.
- ✓ Se vi sendas tradukaĵon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Pri fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Bonvolu sendi vian artikolon rete kiel kutiman retmesaĝon aŭ en format RTF al:

joelmuhire0@gmail.com plej laste, je la fino de ĉiu tria monato.

- ✓ Viaj kontribuoj povas temi pri e-agado en via loĝregiono, poemoj, kulturo (manĝaĵo, vivmaniero, bredado, transporto, ktp), naturo, rakontoj, humuraĵoj, lingvoj, ktp.

Koran antaŭdankon pro via kontribuo!



DKEA: Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio, fondita en 1963.

DKEJO : Demokratia Kongolanda Junulara Organizo, fondita en 1984.

ILEI: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
www.ilei.info.

Subtenu la redaktoran laboron : UEA-konto : jmhr-a.

Promociado de Esperanto en Demokratia Respubliko Kongo: Defio, kiun ni devas atingi kune

Waziwazi Grâce – Goma

Demokratia Respubliko Kongo (DRK), lando riĉa je kulturaj kaj lingvaj diversecoj, alfrontas gravajn defiojn, precipe en sia orienta regiono, kie milito kaj malstabileco daŭras. En ĉi tiu malfacila kunteksto, grupo de junaj esperantistoj kunvenis por porti mesaĝon de espero, unueco kaj paco per la promocio de Esperanto.

Junaj kaj engaĝita teamo



La nova estraro de DKEJO, konsistanta el kvin membroj, reprezentas diversecon kaj decidemon. Waziwazi Grâce, la prezidanto loĝanta en Goma, gvidas tiun teamon kun la celo fari Esperanton ilo por proksimigi komunumojn. Ramazani Nanjira, la vicprezidanto loĝanta en Uvira, alportas sian energion por etendi la influon de Esperanto en foraj regionoj. Djofina Mungosy, sekretariino, kaj Ornella Idumba la kassistino, el Goma, certigas la loĝistikon kaj administradon de rimedoj. Ĉi tiu teamo, plejparte ina, simbolas la engaĝiĝon de junaj kongaj virinoj en la konstruado de pli bona estonteco. Ilia unua pro-

jekto, la registrado de junaj esperantistoj en Kongo, ebligis mapi la bezonojn kaj atendojn de la komunumo.

Esperanto, lingvo por paco



En lando, kie armitaj konfliktoj kaj etnaj dividoj daŭras, Esperanto prezentigas kiel neŭtrala lingvo, kapabla transiri kulturajn kaj lingvajn barojn. En DRK, kie oni parolas pli ol 400 lingvojn, Esperanto povus fariĝi ponto inter komunumoj, antaŭenigante dialogon kaj reciprokajn komprenon.

La Junaj Esperantistoj de DRK planas organizi atelierojn pri lernado de Esperanto en lernejoj, universitatoj kaj komunumaj centroj. Ĉi tiuj atelieroj akompaniĝus de diskutoj pri temoj kiel paco, socia kohereco kaj daŭrigebla disvolviĝo. La celo estas krei reton de engaĝitaj junaj esperantistoj, kiuj povas disvastigi ĉi tiujn valorojn en siaj respektivaj komunumoj. La sekureca situacio en la oriento de DRK, precipe en Norda kaj Suda Kivuo, malfaciligas la efektivigon de projektoj. Ribelantoj kontrolas certajn teritoriojn, limigante moviĝon kaj interŝanĝon. Tamen, la Junaj Esperantistoj rifuzas senkuraĝiĝi! Ili planas uzi ciferecajn teknologiojn por organizi retajn kursojn, retajn seminariojn kaj virtualajn renkontiĝojn.

Krome, lokaj aktivecoj, kiel legokluboj en Esperanto, projekcioj de filmoj subtekstitaj en Esperanto kaj poeziaj konkursoj, estos organizitaj en sekuraj zonoj. Ĉi tiuj iniciatoj celas krei

medion favoran al lernado kaj interŝanĝo, samtempe plifortigante la reziston de junuloj kontraŭ ĉiutagaj defioj.

Vizio por la estonteco

Longperspektive, la Junaj Esperantistoj de DRK revas vidi Esperanton fariĝi rekonata kaj uzata lingvo en edukaj kaj kulturaj institucioj de la lando. Ili deziras organizi nacia kongreson de Esperanto, kunigante partoprenantojn el ĉiuj provincoj por interŝanĝi, lerni kaj celebri kulturen diversecon.

La Junaj Esperantistoj de DRK decidiĝis fari Esperanton ilo por paco, unueco kaj disvolviĝo en sia lando. Malgraŭ la obstakloj, ili kredas je

la forto de junularo kaj internacia solidareco por atingi siajn celojn.

Ni invitas ĉiujn, kiuj dividas ĉi tiun vizion, aliĝi al ni en ĉi tiu aventuro. Kune, ni povas fari Esperanton lingvo, kiu unuigas, inspiras kaj transformas ☺



Waziwazi Grâce estas novelektita prezidanto de DKEJO por trijara mandato (2025-2028) kaj anstataŭanto de Moise Byamungu. Se vi volas iel kunlabori kun DKEJO, bonvolu skribi al : dkejo@outlook.com, aŭ al : +243 976 413 837

ESPERANTO EN RUTSHURU

Honoré Sebuho – Rutshuru

I. ENKONDUKO

La nuna milita situacio travivata en DR Kongo, aparte en la tuta Oriento (Norda, Suda Kivuo kaj Ituri) alvokas nin, agantojn de eduka sektoro al daŭrigo de lernejoj agadoj kaj lernado de nia lingvo Esperanto, malgraŭ la multnombraj sekurecaj defioj. La instruado de Esperanto, lingvo de paco, restas fundamenta kolono por internacia rezistemo kaj ŝlosila faktoro de la sociekonomia evoluo.

Ĝi ludas esencan rolon por havigi al junaj generacioj la sciojn kaj kapablojn necesajn por konstrui stabilan estontecon kaj kontribui kiel engaĝitaj civitanoj, al la firmiĝo de paco, nacia aŭ internacia unueco kaj finfine kolektiva pro-



greso.

Malgraŭ la malfacilaĵoj renkontitaj dum preskaŭ kvar jaroj, ni aŭdace luktas propagandian lingvon. Ni neniam malkuraĝiĝu koncerne disvastigadon de nia lingvo. Ni do plifortigu niajn klopodojn por konsciigi ĉiujn intelektajn junulojn por ke ili serioze lernu utilajn principojn de la iniciatinto de Esperanto, Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

II. A. VERDA STELANO-KLUBO

❖ Lernado kaj evoluo de la lingvo:

- En nia *Verda Stelano-Klubo (VSK)*, komencantoj progresas bone, laŭ la programo de la instruisto Hubert FERREZ.
- La membroj de *VSK* kunvenis la 23-an de Januaro 2025 por mem taksi iujn agadojn faritajn dum la pasinta jaro.

- Superrigardo de junaj volontuloj lerni Esperanton en kvar horoj.
- Familia vizito al nia amiko, kiu perdis siajn gepatrojn.

II. B. INFANA GRUPO "ĈIAM ANTAŬEN"

La infanoj faris du sesiojn de lernado de Esperanto sed en februaro paŭzis pro la ekzamenado en iliaj apartaj lernejoj.

II. C. LA INSTITUTO BUZITO/NJILI

Kiel kutime, en tiu ĉi mezlernejo bone progresas la Esperanto-kurso, en ĉiuj ses klasoj. En la unua semestro, la studentoj ankaŭ trapasis Esperanto-ekzamenon. La dua ekzameno okazos en junio 2025.

III. KONKLUDO

Plendo al vi legantoj:

- Pro la senĉesa milito en nia regiono, la gepatroj malriĉiĝas. Al la studentoj mankas klasĉambroj kaj eĉ pupitroj. La konstruaĵo kie okazas la kurso estas strange nebone konstruita, kaj ne respektas normalan viveblecon; ne sufiĉas la latrinoj por ĉi tiuj ses klasoj.

• Fakte, higienaj kondiĉoj por virinoj preskaŭ ne ekzistas, mankas rimedoj por konstrui sufiĉe da necesejoj. Imagu, kiel nelogike

estas ke knaboj kaj knabinoj uzas la saman latrinon.

- Ni petas al helppretaj esperantistoj financi konstruadon de bona lernejo, almenaŭ 6 klasĉambroj kaj 6 latrinoj, se eblas.

Ĉi tiuj senĉesaj militoj bremsas la progreson de Esperanto en tiu mondparto. Pri ili vi sendube aŭdis paroli televidile, gazete kaj per internaciaj radiostacioj: www.rfi.fr, www.7sur7.cd, www.radiookapi.net, Jeune Afrique, ktp.

Farite en Rutshuru, la **1-an de Februaro 2025**.

Ĉu vi volas kontaktiĝi kun Honoré Sebuho por ekscii pli pri la e-movado en Rutshuru (norda Kivuo), skribu al:

honsebn@gmail.com.



Kara leganto,


Ĉu vi estas kongolandano? Se jes, bone. Kunhelpu do florigi la e-movadon en DR Kongo partoprenante en poresperantaj klubaj aŭ asociaj agadoj, kaj ne forgesu raportoj pri tio !

Viaj spertoj povas sendube avantaĝi al aliaj por pli energie aktivi en la movado.

Ni tre ŝatus ankaŭ legi de niaj eksterlandaj legantoj.

Redakcio.

110-A UK, BRNO: DUA BULTENO KAJ MENDILO HAVEBLAS RETE – JAM EBLAS ALIĜI ANKAŬ AL LA INTERNACIA INFANA-ADOLESKANTA KONGRESETO



Dua Bulteno

La Dua Bulteno de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) haveblas rete: uk.esperanto.net/2025/duabulteno.

Ĉi-jare la UK okazos en Brno, Ĉeĥio ekde la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2025. La Dua Bulteno donas utilajn informojn pri la lando kaj la kongreso (alveno, kongresejo, temo kaj unua rigardo pri la programo) kaj – plej grave – prezentas mendeblajn servojn de la UK, kiel hotelojn kaj ekskursojn. En la paĝo de la UK disponeblas kaj foliumebla versio kaj la elŝutebla PDF-versio.

Mendilo

Ĉiu kongresano ricevis retpoŝte personan ligilon por la reta mendilo. Per tiu ĉi ligilo eblas ankaŭ redakti la mendon poste, elŝuti sian invitilon, aktualigi sian nomŝildon kaj ŝanĝi sian

elekton pri apero en la listo de aliĝintoj kaj la Kongresa Libro.

Internacia Infana-Adoleskanta Kongreseto (IIK)

Jam eblas aliĝi al la 53-a IIK! Ĝi okazos samtempe kun la UK, proskime al la UK-ejo. La IIK estas perfekta ŝanco por viaj infanoj sperti Esperanton en internacia medio kaj trovi amikojn el la tuta mondo. Pliaj infomoj kaj la aliĝilo troveblas ĉe iik.uea.org.

Societo Zamenhof (SZ)

Anoj de SZ estas invitataj al aparta akcepto dum la Universala Kongreso, krom ricevo de speciala cirkulero de la Prezidanto de UEA. UEA invitas ĉiujn membriĝi en Societo Zamenhof – mecenata fondaĵo, celanta doni financon apogon al UEA. Por membriĝi bv. aliri uea.org/alighoj/alighilo.

Partoprenu UK-on

Se vi pretas kunlabori kiel volontulo por la 110-a UK, anoncu vin pere de tiu formularo. Per la Fondaĵo Partoprenu UK-on UEA havas la eblon subteni la aliĝkotizojn de kelkaj kongresanoj, en kelkaj kazoj ankaŭ la manĝo- kaj loĝad-kostojn, preferinde en la plej malaltaj kategorioj. La limdato por kandidatiĝi estas la 28-a de februaro 2025. Ĉiujn detalojn trovu ĉe uea.org/gk/1211.

Bonvenon al Brno!

Tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la 110-a UK, povas tion fari per uk.esperanto.net/2025/. Por resti ĝisdata pri ĉiuj novaĵoj sekvu la UK-paĝojn en [Facebook](https://www.facebook.com/uk2025) kaj [Instagram](https://www.instagram.com/uk2025) kaj aliĝu al la aktiva [Telegram-grupo](https://t.me/uk2025).

Distanca Esperanto-kurso por UEC, Universitato Espero en DR Kongo

Françoise Noireau - Francujo

Renato CORSETTI taskigis min, Françoise NOIREAU, instrui por komencantoj de afrika universitato unue per Zomo (Zoom). La duan jaron, mi utiligis Vacapon (WhatsApp), kaj la aliĝantoj venis pli kaj pli de aliaj afrikaj landoj. Tiel kreiĝis la fakultato pri lingvoj, Esperanto kaj interlingvistiko kun D-ro Renato CORSETTI kiel direktoro kaj Aĥmad MAMDOOHI kiel ĉefa helpanto de ILEI. La tuto estas komuna projekto de UEC, UEA kaj ILEI.



• **Parolaj Ekzamenoj:** Dufoje jare, per videokunsido antaŭ internacia ĵurio.

• **Kosto:** Senpagaj kurso kaj dipltestilo, sed sen mencio de la universitato UEC.

Kurso de 100 lecionoj kaj 10 testoj

La kurso funkcias jam tri jarojn. La instruado okazas en la franca. La metodo estas rigora kaj preciza: la instruisto sendas la lecionojn unu post la alia, ĉiun kun solvenda tasko. La studento respondas en sia tempo kaj mem korektas siajn erarojn. Post ĉiu 10-a leciono, estas testo kun 10 demandoj, kaj la studento ripetas necesajn lecionojn antaŭ ol repasi la teston por plibonigi sian rezulton.

Defio de distanca instruado

Utiligi Vacapon anstataŭ Zomon por la kurso ebligas individuan rilaton kaj kontrolon de ĉiu lernanto. Tamen, estas malfacile postuli regulan respondadon pro diversaj obstakloj. Por instigi la studentojn, oni povas memori pri la Zom-parolekzameno, kun ebleco akiri diplomon. Nia granda ĉagreno, kiel instruistoj, estas la malregula respondado kaj la maldiligenta lernado de niaj gelernantoj.

Fine, nur unu el kvin studentoj daŭrigas sian lernadon.

Citaĵo de GADOUFIA, help-instruisto pri la unua klas-grupo: *“Lerni vacape postulas grandan motiviĝon de la lernanto, kaj instrui vacape postulas grandegan paciencon de la instruisto.”*



Universitato Espoir en Baraka, Kongo DR

Fakultato pri Esperanto kaj Interlingvistiko
Kursoj Esperanto 1, Esperanto 2. Esperanto 3

Registrllo por la kursoj

Persona nomo:

Familia nomo:

Loĝanta en (urbo):

ret-adreso:

telefon-numero:

kompreninte, ke la kurso estas senpaga sed ĉeesto de la lecionoj kaj plenumado de la hejmtaskoj deva

petas esti registrita kiel studento en la kurso:

subskribo:

Universitata kadro

Registrllo: Mi registras la plenan kontakton de ĉiu nova lerninto, kun lia aŭ ŝia promeso regule lerni.

• **Klasgrupoj:** La lecionoj 1 ĝis 70 konsistigas apartajn klasgrupojn kun apartaj instruistoj. Ekde leciono 71 ĝis 100, mi estas la instruisto.

Kial Vacapo?

En Afriko, Vacapo estas vaste uzata. Vacapo ebligas sendi voĉajn kaj tekstajn tujmesaĝojn, kaj ankaŭ klarigajn bildojn.

Avantaĝoj: Vacapo estas malrigida, ebligante daŭran komunikadon inter instruistoj kaj studentoj eĉ kun elektraj paneoj, sen tempo-premo. Malavantaĝoj: Alta kosto de modernaj telefonoj kaj sufiĉa memor-spaco por konservi lecionojn. Kongruo: Vacapo ebligas socikomunikan instruadon kaj subtenas izolitajn komencantojn per grupoj kaj kanaloj.

“Komunumo” en Vacapo

Mi kreis komunumon por la kurso ĉe UEC, kiu enhavas 33 grupojn: estas 10 klasgrupoj por la serioj de lecionoj, parolmetoda grupo, grupo por prepari parol-ekzamenon, grupo por lerni per la suahila, per la angla k.a. Ĉiu instruisto raportas pri siaj studentoj.

Aldone, ekzistas tri grandaj sociaj grupoj en Vacapo, por afrikanoj ne registritaj en UEC. En tiuj grupoj, oni interŝangas informojn kaj mi disdonas movadajn informojn.

Instruista teamo

Mi laboras kun pluraj help-instruistoj: A. Messa, Alexandrine, Daniel K., Eloi, François, Gadoufia, Hassan, Jacques, Jean de Dieu, Lafi, Love, Miora, Nestor, Serge Ch., Serge V., Joel Muhire kaj Victor. Estas preskaŭ 500 homoj en tri grandaj grupoj kaj pli ol 190 registritoj en la individua distanca kurso. Ni havas apartan Vacap-grupon por instruistoj. Kelkaj instruistoj organizas dimanĉan voĉan grupon alvokon por instigi paroladon.

La kurso per Vacapo laŭ mia metodo

La instruistoj sendas lecionojn sinsekve, kaj studentoj devas respondi al tri lecionoj semajne. Tiel, ili restu unu monaton en ĉiu klasgrupo, kaj plenumos la kurson en 10 monatoj. La kurso, origine, estas adaptaĵo de tiu de Esperanto Argentina. Mi aldonis parolajn

ekzercojn (dialogojn kun truoj por mankantaj vortoj) kaj skribajn testojn. Instruistoj ne donas respondojn sed nur indikojn, tiel ke studentoj povu sin mem korekti. Gramatiko estas instruata individue, dum sociaj komunikadoj okazas en grandaj grupoj, kie mi diskonigas movadajn novaĵojn.

Skribaj testoj por komencantoj

La testoj en la kurso okazas per Vacapo kaj konsistas el 10 demandoj, plej ofte korektindaj frazoj, por malhelpi fraŭdojn. Ĉiu demando rilatas al la sam-numera leciono, do se studento eraras en demando 32, necesas retrapasi la lecionon 32.

Tabelo por raportoj la progresojn

La instruistoj raportas al mi pri la finsolvitaj testoj, kiujn mi registru en ekstera tabelo. La tabelo montras la progresojn de la studentoj.

Parol-ekzamenoj

Mi organizas du parol-ekzamenojn ĉiujare, en februaro kaj julio, per Zomo aŭ helpe de Vacapo. La ĵurio konsistas el la direktoro de la fakultato, membro de la ekzamena komisiono de ILEI, la prezidanto de ILEI kaj mi. Por prezenti sin antaŭ la ĵurio necesas esti registrita studento en UEC kaj esti trapasinta skribajn testojn.

Diplomoj

La diplomoj estas atestiloj de ILEI. Eblas akiri emblemon de UEC sur la atestilo, sed tio estas aparte pagenda al la rektoro D-ro Elisée Byelongo (10\$).

Konsiloj por instrui per Vacapo

Utiligo de Vacapo por instruistoj:

1. Vi povas serĉi en mesaĝa kesto por trovi, en kiu leciono aperis specifa nocio.

2. Vi povas tajpi per dikaj literoj aŭ kursive, forstreki partojn de frazoj, kaj kapti ekrankopion.

3. Vi povas antaŭ-registri voĉajn klarigojn kaj sendi ilin al via propra adreso por poste sendi ilin al studentoj.

4. Vi povas uzi kolorajn reagojn kaj mienetojn.

Konsiloj pri instruado:

1. Se studento ne solvas problemon, kreu novan frazon similan al la ne-solvita unua.

2. Instruu Fundamentan Esperanton, sekvu la konsilojn de la Akademio. Konsilu klavarojn kun supersignoj.

3. Uzu la programeton Kōnele por pli rapide tajpi per voĉo.

Du superaj kursoj


La fakultato ofertas du pliajn superajn kursojn:

1. Nivelo B2: Kurso pri historio de Afriko, instruita de D-ro Renato Corsetti. Bedaŭrinde ĉesigita.

2. Nivelo C1: Supera kurso pri enkonduko al interlingvistiko, instruata de S-ro Ahmad Mamdoohi.

UEC-Fakultato-pri-lingvoj@groups.io kaj

UEC-lingvo-fakultato@gmx.com



Françoise Noireau, estas instruistino de Esperanto el Francujo.

Kontaktoj :

desirdapprendre@gmail.com,

+33 609 120 374.

AMO ESTAS PLI FORTA OL TIMO

Ne mirinde ke danke al Esperanto eblas trovi sian amon ! Fakte en esperantujo multas familioj kiuj kreiĝis post renkontiĝo de du samideanoj el malsamaj devenoj. Dum la 109a UK enamiĝis s-ano Ben Indestege el Belgio al s-anino Miriam Alliance el Rutshuru, DR Kongo. Spite la nuntempan tre timtremigan situacion en la oriento de DR Kongo, sinjoro Ben aŭdacis veni al Goma por mem palpi la realecon pri la freŝa milito okazinta en Goma januarfine, kaj edziĝi al Miriam. Kiel amo estas pli forta ol timo ! Trafe, ili finfine geedziĝis en februaro en la ĉeesto de la familianoj de Miriam, pastoroj kaj kelkaj lokaj esperantistoj!

Gratulojn al tiu paro, prosperan kunvivadon al ili !

Redakcio



KJBEL, Komitato de Junuloj por Bona Evoluo de la Internacia lingvo Esperanto

Jean de Dieu Kikako – Goma

KJBEL estas grupo de junaj esperantistoj funkcia en la urbo Goma (Oriente de DR Kongo). Ĝi estis kreita en la jaro 2019 kun la celo kontribui al la antaŭenigo de Esperanto en en la tuta mondo, ĉefe per eldonado de filmoj.

Tuj post ĝia kreiĝo, ni starigis estraron kiu estas ŝanĝata post 2 jaroj.



Kion ni faras en la grupo?

La grupo organizas trejnadon de Esperanto kaj aktivas grandparte en kultura kampo.

Kulture, ni jam realigis plurajn filmetojn mem-finance; la unua filmo estis *Malbona amiko*, filmo kiu spegulas la vivon de iu direktoro kiu estis en bona rilato kun la laboristoj, bedaŭrinde el la laboristoj, estis unu kiu ne amis la direktoron. Li decidis veneni lin, kaj ve, la direktoro mortis! Tiu filmo daŭras ĉirkaŭ unu horo.

Ĉar ni tiam ne havis eĉ kanalon ĉe jutubo, nek ejon por spektigi la filmon, venis ideo iri ĉe diversaj televidstacioj de Goma por serĉi eblon havi atenspacon por nia filmo. Multaj el la aŭskultantaro demandis al la ĵurnalistoj pri la lingvo de la filmo,

Kulture, ni jam realigis plurajn filmetojn mem-finance, la unua filmo estis *Malbona*

kaj tiuj rekte li kontaktadis nin por klarigi. Multaj eksciis pri Esperanto

danke al tio. La projekto komenciĝis, sed fine la afero ne iris glate pro la fakto ke la ĵurnalistoj de diversaj televidstacioj postulis monon por elsendado de niaj filmoj; ni ne havis monon por tio kaj ni decidis do forlasi la projekton.

Niaj instruistoj estis la unuaj por spekti la filmon kaj provis korekti, komenti, ktp.

Multaj spektantoj kritikis pri la longdaŭreco de la filmo, kio igis nin decidi ekludi mallongajn filmetojn kun malpli ol 10 minutoj.

Unu el niaj instruistoj *Nickson Kasolene* helpis la grupon havi jutuban kanalon. La grupo daŭrigis la verkadon de aliaj filmoj, kvankam malfacile, ĉar mankis subteno de ekstere.

Daŭrigota ☼



Se vi volas kunlabori kun KJBEL pri kinoarto, skribu al jeandekikako@gmail.com, vacape : +243 976 971 837

LUBUMBAŜO ALPAŜAS ESPERANTUJON

Espoir Ngoma Kasati - Lubumbaŝo



En la oficejo pri Scienca Esploro ĉe ISP

Estas vere, ke per flugiloj de facila vento nun de provinco flugas ĝi al alia provinco! Kvankam estante en senĉes(em)a sanga milito de jardekoj, Demokratia Respubliko Kongo ne ĉesas montriĝi sufiĉe akceptema al esperanto danke al la enlandaj, eĉ de loko al loko konstante forfuĝantaj esperantistoj, Esperanto plufloras kiel ĉiam. Post la jam vaste rekonataj esperantistaj provincoj precipe tiuj el orienta parto kaj okcidenta, estas la vico de la suda parto esperantiĝi, temas pri Lubumbaŝo, kupra urbo. Estante unu el la plej proksimaj lernantoj de Renato Corsetti, mi konvinkiĝas ke la idealo por kiu mia mastro batalis estas neevideble, ke la mondo bezonas duan lingvon, certe esperanton. El tiu vidpunkto, necesas labori, kunlabori por progresigi tiun ideologion. S-ro Renato Corsetti multon faris tiu-cele, kaj ni devas transpreni liajn taskojn kaj sekvi liajn spurojn. Tial mia agado

fokusas al ĉiuj sferoj de la movado kaj plej specife al la instruado de Esperanto en ĉiu ajn loko, kie eblas instrui. Niaj kluboj bone fartas kun kelko da membroj. Sed en Afriko intelektuloj malofte interesiĝas pri klubetoj en niaj kvartaloj aŭ rete, kio igas nian agadon sufiĉe limigita ekskluzive al malpli kleraj homoj. Nu, se ni aspiras la finvenkisman, indas atingi ĉiujn sociajn tavolojn reklamante, disvastigante esperanton. Por plenumi tiun ĉi celon, mi trovis bona la ideon enradikigi esperanton en universitatojn kvankam tiu celo ŝajnas malfacile atingebla pro striktaj kondiĉoj de la universitatoj, sed ni ne restu teoriaj male ni klopodu sproni tiujn, kiuj emas malatenti pri ni, ni marku nian ekziston. Jen la celo pro kiu por la unua fojo, s-ro François Lo Jacomo alvenis en DR. Kongon. Mi klopodis dum du jaroj konvinkante la estrojn de la universitato kie mi studas, pri la graveco de esperanto. Kaj ĉar ili interesiĝas pri interkulturaj interŝanĝoj kaj mem organizas programojn pri lingvoj, ili finfine konsentis pri la propono ekinstrui Esperanton en la universitaton. Tial invitis s-ron François Lo Jacomo al Lubumbaŝo cele al efektiva kunlaboro pri esperanto-instruado en la Universitato dekomence kiel neformala kurso kaj poste kiel formala. S-ro François Lo Jacomo estis solene gastigita de la universitato-karavano el studentoj, instruistoj kaj ĵurnalistoj ĉeestis por filmi, intervjui kaj televidelsendi la informon pri alveno de Esperanto en la universitaton. Granda menciinda rezulto estas, ke mi instruos espe-

ranton al geinstruistoj de la universitato, kompreneble al instruistoj dungitaj de la universitato, ligitaj al ĝi kaj poste tiuj instruistoj ekinstruos al studentoj ĉar mi ne rajtas instrui en universitato pro mia eduknivelo kiu ankoraŭ malsufiĉas por iĝi universitato-instruisto... Tamen, la vizito de François Lo Jacomo alportis aliajn bonajn rezultojn. Krom la vizito ĉe la invitinta universitato "Universitato Moderna de Lubumbaŝo (UML)", interesiĝis aliaj du grandaj universitato kaj supera Instituto Pedagogia. La Instituto Supera Pedagogia (ISP) kaj Universitato de Lubumbashi (UNILU) montriĝis tre interesitaj pri esperanto kaj esprimis la deziron komenci eblajn premisojn pri kiel kunlabori. ISP proponis komencon per seminarioj aŭ konferencoj pri esperantologio aliflanke UNILU atendas oficialan leteron de UEA.

Notindas, ke UNILU estas la dua plej granda registara universitato post la Universitato de Kinŝaso (UNIKIN). Esperindas, ke tia agado estos utiligita ne nur de UEA sed ankaŭ aliĝu al la ideo unuopaj esperantistoj kaj aliaj esperantistaj organizaĵoj ☺



Pri la funkcmankiero de DKEJO

Djofina Mungosy – Goma

La Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo (DKEJO) funkcias en la sekva modo :

ESTRARO

DKEJO estas gvidata de estraro konsistanta el kvin membroj: 1. *Prezidanto*: Waziwazi Grâce, 2. *Vicprezidanto*: Ramazani Nanjira, 3. *Ĝenerala Sekretario*: Djofina Mungosy, 4. *Kasisto*: Ornella Idumba, 5. *Konsilanto*: Carine Idumba.

CELOJ

La ĉefaj celoj de DKEJO inkluzivas:

1. la disvastigon de la uzado de Esperanto en DR Kongo.
2. Arigon de ĉiuj kongaj junaj esperantistoj.
3. Organizado de kulturaj, sciencaj, kaj edukaj eventoj.
4. Antaŭenigon de la uzado de lokaj lingvoj kune kun Esperanto.
5. Stariĝon de ligoj inter diversaj regionoj de Kongo.
6. Akompanadon de komitatanoj el ĉiuj lokaj kluboj por pli bona reprezentado.

AGADOJ

DKEJO organizas :

- ✓ Varbado kaj subtenado de novaj junaj esperantistoj, helpante al ili integriĝi en la organizon.
- ✓ Atelierojn en lernejoj kaj universitatoj por instrui Esperanton.
- ✓ Diskutojn pri paco, socia kohereco, kaj daŭrigebla disvolviĝo.
- ✓ Virtualajn renkontiĝojn kaj retajn kursojn kiuj traktas temojn kiel paco, socia kohereco, kaj daŭrigebla disvolviĝo.

KOMUNIKADO

La organizaĵo uzas ciferecajn teknologiojn por:

1. Retaj seminarioj.
2. Interagado kun membroj.
3. Publikigo de la oficiala informilo "Konga Stelo".

REGULOJ

Post enoficiĝo, la nova estraro kunvenas por ellabori jarplanon kaj dividi taskojn inter la membroj.

RETEJOJ KAJ KOMITATOJ

Komitatanoj A kaj B de DKEJO

DKEJO distingas inter du kategorioj de komitatanoj, nome Komitatanoj A kaj Komitatanoj B. Ĉi tiuj kategorioj havas specifajn karakterizaĵojn kaj rolojn:

Komitatanoj A

Reprezentantaro: Komitatanoj A estas reprezentantoj de kluboj, kiuj estas gvidataj de junuloj (aĝantaj sub 36 jarojn).

Aŭtomata Ĉeesto : Ĉi tiuj komitatanoj estas aŭtomate inkluditaj en la komitato, kio signifas, ke se klubo havas junajn membrojn, ili rajtas havi reprezentanton en la komitato.

Decidado : Ili havas voĉon en la decidoj faritaj de la komitato, inkluzive la elekton de la estraro kaj aprobon de agadoj.

Komitatanoj B

Elektita Reprezentantaro: Komitatanoj B estas elektitaj laŭ la nombro de landaj provincoj, kaj ĉiu provinco kun eĉ unu esperantisto rajtas havi unu Komitatano B.

Diversa Reprezentado : Ili reprezentas diversajn regionojn kaj klubojn, kaj ilia tasko estas helpi krei ligojn inter la organizaĵo kaj lokaj kluboj.

Decidado: Komitatanoj B ankaŭ havas voĉon en la komitato, kontribuante al la decidprocezoj kaj strategioj de DKEJO.

Rolo de Komitatanoj

Kunlaboro: Ambaŭ tipoj de komitatanoj laboras kune por subteni la agadon de DKEJO kaj kunordigi la interagojn inter lokaj kluboj kaj la centra organizaĵo.

Partopreno en agadoj: Ili partoprenas en kunvenoj, organizas eventojn, kaj helpas en la disvastigo de Esperanto en siaj respektivaj regionoj.

Rilatoj : Ili estas kritikaj por konstrui kaj subteni rilatojn inter la organizaĵo kaj ĝiaj membroj, certigante, ke la bezonoj kaj opinioj de la junaj esperantistoj estas konsiderataj.

LA RILATO INTER DKEJO KAJ DKEA

La Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo (DKEJO) kaj la Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA) havas proksiman kaj reciproke subtenan rilaton. Jen kelkaj aspektoj de ilia kunlaboro:

1. Subteno kaj Gvidado

➤ DKEJO estas la junulara sekcio de DKEA, kio signifas, ke ĝi estas sub la gvidado kaj protekto de la gepatra organizaĵo. DKEA ofertas strukturon kaj resursojn por subteni la agadojn de DKEJO.

➤ DKEA helpas en la organizo de eventoj, disponigas financon subtenon, kaj faciligas la komunikadon inter junaj esperantistoj kaj pli maljunaj membroj de la esperantista movado.

2. Komunikado kaj Informado

➤ DKEJO kaj DKEA laboras kune por certigi, ke la informoj kaj aktualaj eventoj de ambaŭ organizoj estas komunikeblaj al ĉiuj membroj.

➤ La oficiala informilo de DKEJO, "*Konga Stelo*", ofte kunlaboras kun DKEA por reflekti la agadojn kaj eventojn, kiuj okazas en la lando.

3. Organizaj Agadoj

➤ Ambaŭ organizaĵoj organizas kunajn eventojn kaj projektojn, kiuj celas disvastigi Esperanto en Demokratia Respubliko Kongo, inkluzive edukajn programojn, kulturajn eventojn, kaj kongresojn.

➤ DKEJO, kiel junulara sekcio, ofte enfokusigas sin pri agadoj, kiuj allogas junulojn, dum DKEA pli ĝenerale traktas la interesojn de ĉiuj esperantistoj en la lando.

4. Politika kaj Socia Agado

➤ DKEJO, sub la gvidado de DKEA, ankaŭ partoprenas en politikaj kaj sociaj konversacioj, kiuj influas la esperantistan movadon en Kongo.

➤ Ambaŭ organizaĵoj laboras por antaŭenigi pacon, unuecon kaj kulturan diversecon

en la lando, uzante Esperanton kiel ilon por komunikado.

RILATO INTER TEJO KAJ DKEJO

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj la Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo (DKEJO) havas proksiman kaj strategian rilaton. Jen kelkaj ŝlosilaj aspektoj de ilia kunlaboro :

1. Subteno de Junulara Movado

➤ DKEJO estas membro de TEJO, kio signifas, ke ĝi profitas de la subteno, resursoj, kaj ĝenerala strukturo de la tutmonda junulara organizo.

➤ TEJO helpas DKEJO-n en la disvolvado de agadoj kaj eventoj, provizante informojn, materialojn, kaj konsilojn pri junularaj iniciatoj.

2. Organizado de Eventoj

➤ DKEJO partoprenas en internaciaj eventoj organizataj de TEJO, inkluzive kongresojn, seminariojn, kaj laborkunsidojn. Ĉi tiuj eventoj ebligas al DKEJO-membroj interŝanĝi ideojn kun junuloj el aliaj landoj.

➤ TEJO ankaŭ subtenas DKEJO-n en la organizado de lokaj eventoj, helpante en la planado kaj reklamado.

3. Edukado kaj Trejnado

➤ TEJO ofertas trejnadon kaj edukajn programojn, kiuj helpas DKEJO-membrojn plibonigi siajn kapablojn en organizado, komunikado kaj lingvo-instruado.

➤ La edukaj iniciatoj de TEJO povas esti utilaj por DKEJO en la preparado de atelieroj kaj eventoj en DR Kongo.

4. Internacia Retejo

➤ DKEJO povas uzi la internacian reton de TEJO por varbi novajn membrojn kaj integri kun aliaj junularaj organizoj.

➤ TEJO helpas DKEJO-n en la kreado de ligoj kun aliaj junularaj sekcioj en Afriko kaj tutmonde, plifortigante la solidarecon inter esperantistoj.

5. Politika Agado

Ambaŭ organizaĵoj laboras por antaŭenigi valorojn de paco, unueco, kaj lingva diverseco. DKEJO, sub la gvidado de TEJO partoprenas en internaciaj diskutoj pri la rolo de Esperanto en la sociaj kaj politikaj areoj.

FINANCO

La organizaĵo dependas de membrokotizoj kaj donacoj por financi siajn agadojn.



VIZIO

DKEJO revas pri agnosko de Esperanto kiel lingvo en edukaj kaj kulturaj institucioj kun la longtempa celo organizi nacian kongreson de Esperanto.

INVITO

DKEJO invitas ĉiujn junulojn kiuj interesiĝas pri Esperanto, aliĝi al la organizaĵo kaj partopreni en ĝiaj agadoj por konstrui pacan estontecon de nia lando danke al Esperanto ☺

Anoncoj pri korespondpeto :

1. **Neema Machombo**, 21-jaraĝa esperantistino el Rutshuru – Norda Kivuo (DR Kongo). Ŝi deziras korespondi kun aliaj esperantistoj por plibonigi sian Esperanton. Ŝi komencis lerni Esperanton en 2024.
Rete : neemamachombo@gmail.com, vacape : +243985956871.
2. **Serge Rusaki**, delonga aktiva esperantisto el Goma - Norda Kivuo (DR Kongo). Li diplomiĝis pri Elektra Inĝenierado en 2020 kaj nuntempe laboras en humanitara organizaĵo kiel energia respondeculo. Dum libera tempo, li ŝatas fari filmetojn, uzi artefaritan intelekton kaj tre scivolemas pri la progreso de la teĥnologio. Li estos 31-jara la 10an de Aprilo 2025. Li ŝatas fari amikojn tra la mondo, kaj tre ĝojus se vi ankaŭ dezirus konatiĝi kaj amikiĝi kun li.
Rete : sergerusaki@gmail.com.



3. **Merveille Batumike**, membro de Goma Esperanto Klubo.
Rete : merveillebatumike@gmail.com.

MISTERA PAKAJO

Marcelin Luheka – Goma

En la malgranda vilaĝo de BUKUNUNU, kaŝita inter verdaj montetoj, la loĝantoj vivis dum generacioj en harmonio kun la naturo kaj la praaĵoj. La moderneco ŝajnis esti je lumjaroj for de ĉi tiu trankvila loko, kie la tagoj estis ritmaj per la kanto de birdoj kaj la laboro en la kampoj. Sed iu tago, neatendita ŝanĝo aperis.

Marcelo, respektata kaj bonkora kamparano, ricevis misteran pakaĵon. Malferminte ĝin, li malkovris strangan kaj sofistikan maŝinon, akompanatan de noto: "Kara Marcelo, jen artefarita intelekto por helpi vin en viaj ĉiutagaj taskoj. Uzu ĝin bone."

Marcelo, scivolema sed singarda, nomis la maŝinon "margareto" kaj decidis vidi, kion ĝi povus fari. Margareto estis kapabla antaŭdiri la veteron, doni konsilojn pri la kultivaĵoj kaj eĉ detekti malsanojn de plantoj. Rapide, la rikoltoj de Marcelo fariĝis la plej abundaj en la vilaĝo.

Tamen, la najbaroj de Marcelo komencis murmuri. Ili vidis Margareto, kun ĝiaj lumantaj signaloj kaj sintezaj voĉoj, kiel specon de sorĉado. "Kiel li povas scii ekzakte kiam pluviĝos? Ĉi tio estas kontraŭnatura!" ili diris. La timo kaj suspekto kreskis, kaj kelkaj eĉ evitis Marcelon kaj lian farmon.

Vespere, urĝa kunveno estis kunvokita de la urbestro de la vilaĝo. La loĝantoj, zorgoplenaj kaj timigitaj, kolektiĝis en la komuna halo. "Ni devas haltigi ĉi tiun sorĉadon antaŭ ol ĝi alportos malfeliĉon," deklaris maljunulo de la vilaĝo, balancante sian paŝtistan bastonon.

Marcelo, kvankam malĝoja pro la akuzoj, leviĝis trankvile. "Miaj amikoj, lasu min klarigi," li diris per milda sed certa voĉo. "Margareto ne estas sorĉado. Ĝi estas maŝino, homa kreaĵo

destinita por helpi nin. Ĝi uzas datumojn kaj algoritmojn por analizi la klimaton kaj la teron, kio ebligas al ĝi antaŭdiri la kondiĉojn meteorologiajn kaj optimumigi la kultivaĵojn."

Vidante la vizaĝojn ankoraŭ markitajn de timo kaj malkompreno, Marcelo daŭrigis: "Pensu pri ĝi kiel pri ilo, same kiel niaj prapatroj uzis plugilojn kaj ventmuelilojn por plifaciligi sian laboron. Ni devas adaptiĝi al la novaj teknologioj, same kiel ili faris."

La vilaĝanoj, kvankam ankoraŭ hezitantaj, komencis interŝanĝi rigardojn kaj flustri inter si. La urbestro, kiun ĉiuj respektis, paŝis antaŭen kaj parolis: "Marcelo, ni vidis kiel viaj rikoltoj prosperas, kaj ni ne povas nei la avantaĝojn kiujn Margareto alportis. Sed ni devas certigi ke ĉi tiu teknologio ne endanĝerigos nian tradicion kaj harmonion kun la naturo."

Marcelo kapjesis kun komprenemo. "Mi komprenas viajn zorgojn. Margareto estas nur ilo, kaj ni devas uzi ĝin respondece. Mi promesas ke mi montros al vi ĉiuj kiel ĝi funkcias, kaj ke ĝi estos uzata nur por subteni nian komunumon kaj nian vivmanieron."

La vilaĝanoj iom post iom malstreĉiĝis kaj konsentis doni al Margareto ŝancon. La sekvan tagon, Marcelo organizis demonstraĵon sur sia kampo, klarigante la funkciadon de Margareto kaj kiel ĝi helpas antaŭdiri la veteron kaj diagnozi planto-malsanojn. Vidinte la praktikan aplikon kaj la klarajn avantaĝojn, la timo kaj suspektoj de la vilaĝanoj komencis malaperi.

Kun la paso de la tempo, Margareto fariĝis nemalhavebla parto de la vilaĝa vivo. La maŝino helpis ne nur Marcelon, sed ankaŭ liajn najbarojn, kiuj komencis alporti siajn proprajn rikoltojn por esti analizitaj. La vilaĝo prosperis kiel neniam antaŭe, kun abundaj rikoltoj kaj kreskanta komuna fido en la novaj teknologioj.

Finfine, la vilaĝo de Bukununu montris ke tradicio kaj teknologio povas kunekzisti harmonie, kaj ke la vera sorĉado troviĝas en la kapablo adaptiĝi kaj lerni unu de la alia. Marcelo,

kun Margareto ĉe sia flanko, fariĝis simbolo de progreso kaj komuna avantaĝo, gvidante sian komunumon en novan eraon de prospero kaj kunlaboro.

Forpasis nia mentoro, Dr. Renato Corsetti

Joel Muhire – Goma

Forpasis Renato Corsetti en la aĝo de 83 jaroj, la 1an de februaro 2025. Li estis inter la pioniroj de Esperanto en Afriko kaj ĉiam ĝojis kiam venis al li raporto pri nova klubo, afable kuraĝigis novulojn plulerni Esperanton, helpis trovi legolibrojn por ĉiuj kluboj kaj komencantoj ilin bezonantaj. Dum sia esperantista vivo, li multmaniere agadis por la promocio de Esperanto. Li estis ne nur amiko sed mentoro de multaj tra la mondo.

En esperantujo, li iam ludis gvidajn rolojn en TEJO kaj UEA, estis membro de la Akademio de Esperanto, de ILEI, ktp. Li multe verkis artikolojn por diversaj gazetoj, tradukis artikolojn de la Kuriero (revuo de UNESKO en Esperanto), verkis La Gramatikon de Lingvo Sen Gramatiko (2018), ktp.

En 2021 li iniciatis distancan instruadon de Esperanto kadre de la *Universitato Espoir du Congo, UEC*, en Baraka, Suda Kivuo (pri tio

trovu detalojn ĉe la paĝo 7). Renato Corsetti, malgraŭ sia aĝo kaj sanstato, ĉiam kuraĝis lerni ion novan, ekzemple, antaŭ la 109a UK li diligente partoprenadis en sŭahila retkurso (per zoom) far Joel Muhire. Laŭ la afrika proverbo, *forpaso de maljunulo estas kvazaŭ bruliĝinta vortarego*, estas do granda perdo por esperantujo kaj familianoj!

La esperantistoj, aparte kongolandaj tenos daŭre bonan memoron pri Renato, pri liaj kuraĝigoj revigligi la kongolandan e-movadon. Kondolencojn al liaj familianoj kaj al esperantujo, pacon al lia animo eterne !

La funebra ceremonio okazis la 3an de marto 2025 en Londono, Britio★



KONDOLENCON AL LA FAMILIO KAJ ESPERANTIO

Mesaĝo de kondolenco al la familio de **Dr. Renato Corsetti** kaj **Esperantujo**:

Mi, mia familio kaj ankaŭ la membroj de Verda Stelano-Klubo el Rutshuru, Norda Kivuo (DR Kongo), tre bedaŭras ekscii pri la forpaso de Renato Corsetti. La animo de nia esperantista kamarado kaj instruisto Renato Corsetti ripozu pace en la lando de niaj prapatroj!

Nome de Verda Stelano-Klubo, **Honoré Sebuhero**.

Esperanto, ĉu ĝi estas pakto kun la diablo?

Waziwazi Grâce – Goma

Ĉi tiu demando, kiom miriga ĝi povas ŝajni, meritas esti pridemandata, eĉ se nur por dispeli la miskomprenojn, kiuj ĉirkaŭas ĉi tiun lingvon. En Afriko, Esperanto, ofte vidata kiel simpla lingva kuriozaĵo, foje estis objekto de suspektoj kaj strangaj famoj, eĉ ĝis asocio kun okultaj aŭ malbonfaraj praktikoj. Sed fakte, ĉi tiu ideo estas tre malproksima de la vero. Por kompreni kial, necesas esplori la originojn, valorojn kaj idealojn, kiuj donis naskiĝon al Esperanto – lingvo, kiu ĉefe reprezentas pacon, unuecon kaj esperon. Esperanto estis kreita en 1887 de Ludwik Lejzer Zamenhof, pola kuracisto, inspirita de profunda humanisma revo. Zamenhof vivis en regiono markita de etnaj kaj lingvaj streĉiĝoj, kaj li vidis en la diverseco de lingvoj fonton de miskomprenoj kaj konfliktoj. Lia celo ne estis anstataŭigi ekzistantajn lingvojn, sed proponi neŭtralan lingvon, facile lerneblan, kiu permesus al ĉiu komuniki sur egala fundamento. Malproksime de tio ke ĝi estas malica aŭ okulta projekto, Esperanto estis konceptita kiel ilo de paco, rimedo por proksimigi popolojn kaj antaŭenigi reciprokan komprenon. Tamen, malgraŭ ĉi tiuj noblaj intencoj, Esperanto foje estis objekto de suspektoj kaj miskomprenoj. La ideo, ke ĝi povus esti "*pakto kun la diablo*", verŝajne naskiĝis pro nekonado de ĝia origino kaj celaro. Eble kelkaj estis konfuzitaj de la fakto, ke ĝi estas konstruita lingvo, kreita de nulo, kio povis nutri fantaziojn aŭ neraciajn timojn. Sed fakte, nenio estas mistera aŭ simple lingvo, zorgeme kajlopaco kaj unueco. Cetere, la simtas ĝiajn humanismajn valorojn. prezentas esperon – esperon pri plu dividas homojn. La verda kontinentojn, memorigante, ke ĉi tiu lingvo estas destinita al ĉiuj, sen distingo de kulturo aŭ nacio. Ĉi tiuj emblemoj estas invitoj al malfermiteco kaj frateco, tre malproksime de ia ajn negativa aŭ okulta konotacio. La historio de Esperanto montras ankaŭ, ke ĝi ofte estis perceptita kiel minaco de tiuj, kiuj celis dividi aŭ regi. Sub la nazia reĝimo, ekzemple, Esperanto estis malpermesita kaj persekutata, ĉar ĝi estis konsiderata kiel ilo de rezisto kaj unueco inter popoloj. Simile, en Sovetunio sub Stalin, esperantistoj estis subpremataj, ĉar ilia idealo de universala komunikado kontraŭis la totalisman ideologion. Ĉi tiuj persekutoj montras klare, ke Esperanto havas nenion komunan kun malbono aŭ satanismo – male, ĝi reprezentas valorojn de libereco, toleremo kaj kunlaboro, kiuj ĝenas tiujn, kiuj celas subpremi. Hodiaŭ, Esperanto daŭre estas uzata de miloj da homoj de diversaj kulturoj kaj lingvoj tra la mondo, ne por mistikaj aŭ obskuraj kialoj, sed por batali por la paco. Ĝi estas uzata en internaciaj kongresoj, edukaj projektoj, kulturaj interŝanĝoj, kaj eĉ en interreto, kie ĝi servas kiel neŭtrala lingvo por diskutoj inter homoj el malsamaj landoj. Organizaĵoj kiel la Universala Esperanto-Asocio (UEA) aktive laboras por antaŭenigi ĉi tiujn valorojn de toleremo kaj reciproka kompreno. Do, kiel oni povus imagi, ke ĉi tiu lingvo, naskita el revo por paco kaj unueco, povus esti "*pakto kun la diablo*"? Ĉi tiu ideo ne rezistas al ekzamenado de la faktoj. Esperanto havas nenion komunan kun satanismo aŭ okultismo; male, ĝi estas esprimilo de la volo kompreni unu la alian, kunlabori kaj vivi kune en harmonio. Malproksime de tio ke ĝi estas pakto kun la diablo, Esperanto estas pakto kun espero – espero pri mondo, kie komunikado ne plu estas barilo, sed ponto al paco kaj amikeco ☺



malbona en Esperanto. Ĝi estas gike kreita, por servi idealon de boloj de Esperanto klare reflektas. La verda flago, ekzemple, remondo, kie lingvaj bariloj ne stelo, aliflanke, simbolas la kvin



Leciono pri la Svahila lingvo

LA IMPERATIVO

1. LA REKTA IMPERATIVO

Ni uzas la Rektan Imperativon por doni "sekan" ordon, kiel estro farus al sia dungito, aŭ gepatroj al sia infano. Ĝi estas la plej simpla verboformo, ĉar ĝi konsistas el ununura verba radikalo. En Esperanto la imperativo estas farata per **la finaĵo U**.

Se ni prenas la verbon, ekzemple **KUFANYA**, ni simple forigas **la prefikson KU-** de la infinitivo, kiu donas: **FANYA! = FARU!** La Rekta Imperativo havas nur 2 personojn: la duan personon singularan (= "vi") kaj la duan personon pluralan (= pluralo "vi"). La pluralo estas formita anstataŭigante **la finaĵon -A** de la radikalo per **la sufikso -ENI**.

KELKAJ VERBOJ JE LA REKTA IMPERATIVO

2a persono singulara		2a persono plurala	
Fanya!	faru!	Fanyeni!	faru!
Funga!	fermu!	Fungeni!	fermu!
Kamata!	kaptu !	Kamateni!	kaptu !
Ngoja!	atendu !	Ngojeni!	atendu !
Safisha!	purigu!	Safisheni!	purigu!
Sikia!	aŭdu!	Sikieni!	aŭdu!
Soma!	legu! / lernu!	Someni!	legu! / lernu!

APARTAJ KAZOJ: Unusilabaj verboj retenas la **KU-** de la infinitivo:

2a persono singulara		2a persono plurala	
Kula!	manĝu!	Kuleni!	manĝu!
Kunywa!	trinku!	Kunyweni!	trinku!

Verboj de araba origino kondukas kiel verboj de bantua origino ĉe la *dua singulara persono*. En la duapersona pluralo, ni aldonas **-NI** ĉe la fino de la radikalo, sen modifi la finan vokalon (**E, I aŭ U**):

2a persono singulara		2a persono plurala	
Jaribu!	provu!	Jaribuni!	provu!
Rudi!	revenu !	Rudini!	revenu !
(Ni-)samehe!	pardonu (min) !	(Ni-)sameheni!	pardonu (min) !

ESCEPTOJ:

- La verbo **KULETA** (= alporti) donas **LETE!** (= alportu!) anstataŭ **LETA** en la dua singulara persono, plurale ĝi fariĝas **LETENI**.
- La verbo **KUJA** (= veni) donas **NJOO!** (= venu!) kaj **NJOONI!** (= venu!).
La verbo **KWENDA** (= iri) donas **NENDA!** (= iru!) kaj **NENDENI!** (= iru!).

En la svahila, kiel en ĉiuj lingvoj, ju pli ni plilongigas la vortan formulon kiam ni donas ordon, des pli ni mildigas la "sekecon", des pli oni montras sin ĝentilaj. Ofta maniero mildigi la brutalecon de ordo estas uzi la subjunktivon. La imperativo de ĝentileco estas formita forigante la **KU-** de la infinitivo kaj anstataŭigante la **finajon -A** per **-E**. La duapersona singularo ("vi") komenciĝas per la pronoma prefikso **U-**. La duapersona pluralo ("vi") komenciĝas per la pronoma prefikso **M-**.

KELKAJ VERBOJ JE LA IMPERATIVO DE ĜENTILECO

2a persono singulara		2a persono plurala	
Ufanye!	faru!	Mfanye!	faru!
Ufunge!	fermu!	Mfunge!	fermu!
Ulete!	alportu !	Mlete	alportu !
Upike!	kuiru !	Mpike!	kuiru !
Usafishe!	purigu!	Msafishe!	purigu!
Usikie!	aŭdu!	Msikie!	aŭdu!

VERBOJ DE LA ARABA ORIGINO

2a persono singulara		2a persono plurala	
Ujaribu!	provu (provu ĝin!)	Mjaribu!	provu !
Urudi!	revenu !	Mrudi!	revenu !
Usamehe!	pardonu!	Msamehe!	pardonu!

VERBOJ MONOSILABAJ

2a persono singulara		2a persono plurala	
Uende!	iru!	Mwende!	iru!
Uje!	venu !	Mje!	venu !
Ule!	manĝu!	Mle!	manĝu!
Unywe!	trinku!	Mnywe!	trinku!

2. LA IMPERATIVO DE LA UNUA PLURALA PERSONO

Ĝis nun ni vidis nur la imperativon de la 2-a persono (singularo kaj pluralo). Ni vidu la imperativon de la unuapersona pluralo ("ni"). Fakte, ĝi estas formita ĝuste sur la modelo de la ĝentila imperativo, simple anstataŭigante la subjektan prefikson **U-** (= *vi* de ĝentileco) de **TU-** (= *ni*).

KELKAJ EKZEMPLOJ

1-a persono plurala

Tufanye!	ni faru!	Tufunge!	ni fermu!
Tufunge!	ni malfermu!	Tulete!	ni alportu!
Tupike!	ni kuiru!	Tusafishe!	ni purigu!

VERBOJ DE LA ARABA ORIGINO

Tujaribu!	ni provu!	Tusamehe!	ni pardonu!
-----------	-----------	-----------	-------------

VERBOJ MONOSILABAJ**Twende!**

ni iru!

Tule!

Ni manĝu !

3. LA NEGATIVA IMPERATIVO

Estas nur unu negativa formo koresponda samtempe al la rekta imperativo kaj la ĝentila imperativo.

La negacio estas formita jene:

- ni forigas la **KU-** de la infinitivo,
- ni aldonas **la pronoman prefikson U-** por la singularo kaj **M-** por la pluralo,
- ni metas la negativan infikson **-SI-** inter la pronomo kaj la radikalo,
- **la finaĵo -A** de la verbo estas anstataŭigata per **-E** ĉe verboj de bantua origino.

Ekzemploj (mifano):

Bantua verbo	: KU-FANYA	-> -FANYA	-> U-SI-FANY-E
Araba verbo	: KU-JIBU	-> -JIBU	-> U-SI-JIBU
Unusilaba verbo	: KU-LA	-> -LA	-> U-SI -L-E

KELKAJ VERBOJ EN LA NEGATIVA IMPERATIVO

2a persono singulara		2a persono plurala	
Usifanye!	ne faru!	Msifanye!	ne faru!
Usiharibu!	ne detruu!	Msiharibu!	ne detruu!
Usijibu!	ne respondu!	Msijibu!	ne respondu!
Usile!	ne manĝu !	Msile!	ne manĝu !
Usingoje!	ne atendu!	Msingoje!	ne atendu!
Usinywe!	ne trinku!	Msinywe!	ne trinku!

EKZERCOJ**1: Metu ĉi tiujn verbojn en la rektan imperativon:**

Kusikia, kujaribu, kuangalia, kufikiri, kwenda.

2: Metu ĉi tiujn verbojn en la Ĝentileca Imperativo:

Kubadili, kufika, kufanya, kusoma, kuweka, kupika, kusema.

3: Metu ĉi tiujn verbojn en la 1-a persono de la imperativo:

Kubadili, kufika, , kusamehe, kununua, kupika, kufuata, kufungua.

4: Metu ĉi tiujn verbojn en la Negativan Imperativon:

Kuja, kujibu, kufikiri, kufika, kununua, kujaribu, kubaki.

5: Traduku en Esperanton:

- Njoo! Nenda! Fuata! Fanya! Piga! Rudi! Jaribu!
- Njooni! Fanyeni! Jaribuni! Sameheni! Leteni! Nendeni!
- Upike! Usafishe! Mjaribu! Ujue! Uweke! Ule!
- Usijibu! Usisome! Usinywe! Usiangalie! Usiwe! Usikae!
- Msifuate! Msibaki! Msirudi! Msifikiri! Msianguke! Msifungue! Msiketi!



La dek devoj de la Esperantisto

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj.
2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.
3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fidela restu.
4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.
5. Kion vi povis lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵoj ne faru regulon, kaj el la regulo ne faru malgravaĵon.
6. Verkante en Esperanto, ne kredis interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron, ne mal-esperu, se mankas aĉetantoj.
7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu.
8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa, senlace varbu por UEA.
9. Legu gazeton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.
10. Dor Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.